## Pasero

De fora rivero
alflugis pasero,
fenestron frapetis,
pri grajnoj ĝi petis.



## Fruktarbaro

En fruktarbaro
da fruktoj aro
tre bele oras
kaj bonodoras.



## En ĝardeno

En ĝardeno, sur la bedo
floras rozo kaj rezedo.
Anja en ĝardenon iras
kaj la belajn florojn ŝiras.



## Kaprino

Saltetis kaprino
de pino al pino,
ĉar laŭte ekmekis,
lupidojn ĝi vekis



.